

EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo
Redakcio kaj Administracio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio

VOL. 1 N-RO 5
SEPT. 1950

人民中國報道

EN TIU ĈI NUMERO:

Tajvan—Nia Teritorio Liberigota
Sur la Tero de la Demokrata
Koreio
Intelektuloj kaj Agrara Reformo
Kamparanoj Skribis al Prezid-
anto Maŭ
La Film-industrio de Ĉinio

PROTESTO KONTRAŬ USONA BOMBADO EN KOREIO

La Usona registaro estas faranta per sia aerforto la plej barbaran kaj vastan bombadon kontraŭ la civila loĝantaro en la urboj kaj vilaĝoj de Koreio, ĉar ĝiaj invadantaj landfortoj renkontis malvenkon. Multaj urboj, vilaĝoj kaj iliaj hospitaloj, lernejoj kaj kulturaj institucioj estas ebenigitaj kun la tero per bombado, kaj la civiluloj estas grandskale buĉitaj.

La Usona aerforto faligis pli ol 7,000 tunojn da bomboj en unu monato, laŭ publikigo de G. E. Stratemeyer, Komandanto de la Usonaj Ekstremorientaj Aerfortoj, en 15. aŭgusto. Kaj, en 16. aŭgusto, ĉirkaŭ 1,000 tunoj da bomboj estis faligitaj sur la okcidenta bordo de la Naktong-Rivero.

La Korea Demokrata Popola Respubliko jam frue en la komenco de aŭgusto solene protestis al la Sekuro-Konsilo de la Unuigitaj Nacioj kontraŭ la monstraj agoj de la Usona aerforto. La Sovetia delegito Malik proponis haltigi la monstrajn agojn de la Usona aerforto. Sed ĉi tiu propono ne estas balotita ĝis nun, pro la procedaj obstrukcioj en kunveno faritaj de la Usona registaro kiu kontrolas la plimultajn votojn en la Sekuro-Konsilo.

Demokratiaj partioj kaj grupoj kaj popolaj organizoj en Ĉinio firme protestas kontraŭ ĉi tiu barbara bombado fare de la Usona aerforto kaj la dorloto kaj kunlaboro donataj al ĉi tiu bruta bombado de la Usonokontrolata plimulto en la Sekuro-Konsilo. Ni kredas, ke ĉi tiu bombado estas plena malobeo kontraŭ la Ĉarto de la Unuigitaj Nacioj, kontraŭ ĉiuj internaciaj leĝoj kaj kontraŭ humanismo.

La barbara bombado de la Usona aerforto kontraŭ Koreio kaj la barbaraj agoj de la Usona armeo en kreado de senhomaj regionoj en Koreio jam pruvis, ke la Usona registaro kaj ĝiaj sekvantoj ne havas iomete da homa sento al la popolo aŭ en Norda aŭ en Suda Koreio kaj ke ili estas malvarm-sangaj murdemaj agresantoj. Ilia celo ne estas la tiel nomata savo al la korea popolo kiel ili proklamis, sed male, ekstermo de la korea popolo kaj starigo de agresa bazo en Koreio, kie ili povas agi laŭplade.

Ni urĝe apelacias al la popolo tra la tuta mondo, kiu havas homan simpatian, leviĝi kaj desigi la bestan bombadon de la Usona aerforto kaj postuli ke la Sekuro-Konsilo aprobu, sen plua prokrasto, la humanan proponon de la Sovetia delegito en la 8a de aŭgusto.

La Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Konsiliga Konferenco;

La Komunista Partio de Ĉinio;
La Revolucia Komitato de la Kuomintang;
La Ĉinia Demokrata Ligo;
La Demokrata Landkonstrua Asocio;
La Ĉinia Asocio por Antaŭenpuŝi Demokracion;

La Ĉinia Kamparana kaj Laborista Demokrata Partio;
La Ĉinia Ĉihkungtang;
La Ĉiŝan-Societo;
La Tajvana Ligo de Demokrata Aŭtonomio;

La Ĉinia Novdemokratia Junula Ligo;
La Tutĉinia Federacio de Laboristoj;
La Tutĉinia Federacio de Demokrataj Virinoj;

La Tutĉinia Federacio de Demokrataj Junuloj;
La Tutĉinia Federacio de Studentoj;
La Tutĉinia Federacio de Literaturaj kaj Belartaj Rondo;

La Ĉinia Komitato de la Mondpaca Kongreso;

La Kampanja Komitato de la Ĉina Popolo kontraŭ Usona Agreso en Tajvan kaj Koreio;

La Asocio de Ĉini-Sovetia Amikeco;
La Popola Publika Administra de Ĉinio;

La Ĉinia Ruĝa Kruco.

22. aŭgusto, 1950.

NI KONDAMNAS NOVAN

AGRESON DE USONO

Le forta protesto de Ĉou En-laj (周恩来), Ministro por eksterlandaj Aferoj, al Acheson, Usona Sekretario de Ŝtato, pri la entrudo de Usonaj aerplanoj en ĉinan teritorion, kaj lia telegramo al la Sekuro-Konsilo de la Unuigitaj Nacioj postulanta tujan agon kontraŭ la provokaj kaj brutaj agoj reprezentas la voĉon de justeco de la 475 milionoj da popolo en Ĉinio. Alflugas landskalaj protestoj al la Unuigitaj Nacioj kaj subtenoj al la protesto de Ministro por Eksterlandaj aferoj Ĉou En-laj kontraŭ la Usona registaro.

Kunan deklaron faris la Tutĉinia Federacio de Laboristoj, la Tutĉinia Federacio de Demokratiaj Virinoj, la Tutĉinia Federacio de Demokratiaj Junuloj, la Tutĉinia Studenta Federacio kaj Ĉini-Sovetia Amikeca Asocio. La deklaro legigas mallongigite kiel jene:

“Ĉi tiu okazaĵo estas alia pruvo, ke la agresa politiko de la Trumana registaro de Usono kontraŭ nia lando estas freneze efektiva.”

“Ni postulas, ke la Usona registaro tuj punu la Usonajn aerforton pro ĉi tiu provoka kaj bruta ago, kaj respondecu kompenson por ĉiuj perdoj suferitaj de Ĉinio. Ni petas la Sekuro-Konsilon de U.N. efektiviĝi sankeion kontraŭ tia provoka kaj kruela ago entrudi en ĉinan teritorion de la Usonaj agresaj fortoj en Koreio, kaj fari tujajn paŝojn por efektiviĝi la eltirigon de la Usonaj agresaj fortoj, ke la situacio ne pligravigu kaj la paco kaj sekuro en Azio kaj la mondo estu konservata.”

Kunan proteston publikis ankaŭ la Komitato de la Ĉina Popola Kampanjo Kontraŭ Usona Agreso en Tajvan (台灣) kaj Koreio kaj la Ĉina Komitato de la Mondpaca Kongreso.

Fervojaj laboristoj de Antung (安東)—unu el la regionoj atakitaj de la Usona aerforto—ĵuris venĝi siajn fratlaboristojn kaj aliajn civitanojn mortigitajn aŭ vunditajn dum la atakoj. “Ĉi tio estas sanga ŝuldo por kiu ni devas postuli repagon,” ili diris en rezolucio.

Ĉi tiujn sentojn de la Antungaj laboristoj portoprenas la ceteraj el la 210,000 fervojaj laboristoj de la Nordoriento, de kiuj leteroj de kondolenco kaj subteno venas ĉiutage al la familioj de la viktimoj.

La Nordorienta (Manĉurria) Sindikata Konsilo deklaris, “La ungegoj de Usona imperiismo jam atingis nian Nordorienton, damaĝante nian landan proprajn kaj vundante kaj mortigante niajn civitanojn. Tio estas barbara krimo.” Ĝi alvokis la laborantan popolon en la Nordoriento pliiĝi sian vigilancon centoble por “defendi nian patrolandon kaj gardi niajn landlimojn.”

Komandantoj kaj soldatoj de la unuoj de la Popola Liberiga Armeo ege koleras pro la atako en la Nordoriento de Usonaj aerplanoj. Protestoj amase venas de unuoj de aerforto, artilerio, infanterio, kontraŭaeroplana forto kaj aliaj.

Ĉe iu kunveno, kontraŭ-aeroplana kanonisto Kaŭ Jan-ta (高延大) diris, “Ni pretas por ago. Ni pretas paffaligi iajn ajn aeroplanojn, kiuj kuraĝos entrudi en nian teritorion,” dum alia batalanto, Ĉiŝu-juen (邱書元), rimarkis, “Niaj fortoj estas grandaj kaj potencaj. Ni havas la subtenon de la amasoj kaj gvidon de Prezidanto Maŭ Ze-tung (毛澤東) kaj la Centra Popola Registaro. Usona Imperiismo certe gajnos nenion el siaj provokoj.”

Kuo Mo-fo (郭沫若), Prezidanto de la Tutĉinia Federacio de Literaturaj kaj Belartaj Rondo, skribis, “Mi estis en Koreio. Mia persona observo estas, ke la Usonaj agresantoj estas simple hordo da malhumanaj brutoj. Iliaj kruelaĵoj fakte eklipsas tiujn de la japanaj imperistoj kaj la naziistoj. Neniu homo kun iom da sento de deeco povas toleri tiajn agojn.”

Protestoj kun simila enhavo venas de ĉiuj profesiaj rondoj, popolaj organizoj kaj partioj tra la tuta lando. En la tuta lando, homoj diskutas, kunvenas, propagandas kaj transformas sian indignon en forton kaj entuziasmon kaj pli vigle kaj pli decideme lernas, laboras, produktas kaj batalas, unuigite kiel unu homo, por pli frue venkbati la invadantojn kaj liberigi tutan Ĉinion. La Usonaj invadantoj, kiuj kuraĝas fari tiajn rabemajn agojn de provoko rikoltos kion ili semis.



Vana barakto de Usono Sun Ĝing (孫競)

Nombro de pacsubskribintoj en Popola Ĉinio

JAM SUPERAS 100,000,000

KAJ MARŜAS AL 200,000,000!

TAJVAN

NIA TERITORIO LIBERIGOTA

Vang Ĉai-caj (汪昭才)

Tajvan (台灣) kuŝas sudoriente de la ĉeŝtero de Ĉinio, kontraŭ Fukien-Provinco (福建省) trans la Markolo de Tajvan. La ĉefa insulo longas je 400 kilometroj de sudo ĝis nordo kaj larĝas je 150 kilometroj de oriento ĝis okcidento ĉe la plej larĝa loko. La areo de la ĉefa insulo estas 35,961 kvadrataj kilometroj kaj, kune kun Penghu-Insularo (澎湖羣島), estas 36,000 kvadrataj kilometroj.

Tajvan estas parto de la sankta teritorio de Ĉinio. Jam de la fino de a dektria jarcento la ĉina popolo venis al Tajvan. En 1624j. kiam la nederlandanoj invadokupis tiun ĉi insulon, la ĉina loĝantaro jam atingis dudek mil familiojn, ĉirkaŭ cent mil personojn. En 1661j. Ĉeng Ĉeng-kung (鄭成功) kun trupo de 25,000 personoj transiris la Markolon de Tajvan, elpelis la nederlandajn invadintojn kaj uzis Tajvan'on kiel bazon por la batalo kontraŭ Ĉing (清)-Dinastio. Kaj tiam la transloĝantoj al Tajvan de la urboj Amoj (廈門), Ĉangĉoŭ (漳州) kaj Ĉuanĉoŭ (泉州) en Fukien-Provinco des pli multigis. En 1747j, la "gastoj" de la regiono de gubernio Mej (梅) en Kuangtung-Provinco (廣東省) komencis ankaŭ enflui en Tajvan'on. Nuntempe, la loĝantaro de Tajvan nombras ĉirkaŭ 6,500,000, inkluzive nur pli ol 171,000 indiĝenojn.

Komence plej multe el la ĉinaj popolanoj, kiuj transloĝiĝis al Tajvan de la du provincoj Fukien kaj Kuangtung, estis kamparanoj kiuj perdis sian teron sub politika subpremado kaj feŭda ekspluatado sur la ĉina ĉeŝtero. Antaŭe Tajvan estis dezerta insulo, kie ofte okazis damaĝoj de ventego, inundo kaj tertremo kaj ankaŭ disvastiĝis epidemioj. Nur dank'al la longdaŭra ekspluatado de la diligenta kaj kuraĝa ĉina popolo, la dezerta insulo fariĝis regiono riĉa en produktoj.

La ĉefaj terproduktaĵoj de Tajvan estas rizo, sukerkano, teo, batato, fruktoj ktp. La plej alta jarprodukto de rizo iam atingis 17,000,000 hektolitrojn (1938), tiu de sukerkano 12,800,000 tunojn (1938-1939), tiu de teo 14,000 tunojn (1939), kaj pri fruktoj, nur tiu de banano, orango, ananaso kaj longano (Nephelium longana) atingis 25 cent milionojn da kilogramoj en 1939j. La areo de arbaroj estas 70% de tiu de la tuta insulo.

Sukero estas la ĉefa komercaĵo de Tajvan, kaj ĝia jarprodukto iam atingis 1,200,000 tunojn. Kamforo estas speciala produkto de Tajvan, kun jarprodukto de tri milionoj da kilogramoj, okupante la unuan pozicion en la tuta mondo. La ĉefaj mineraloj de Tajvan estas, oro, arĝento, kupro, karbo, petrolo, sulfuro ktp.

En 1895j. la japanaj invadantoj forrabis Tajvan'on el la manoj de la korupta registaro de Ĉing-Dinastio. Ili nomis Tajvan'on "Suda Trezorejo", ĉiujare ekspluatit de ĝi kvarecent milionajn kilogramojn da sukero, cent milionajn kilogramojn da rizo, 35,000,000 kilogramojn da petrolo, kaj krome monopolis tiajn naturajn riĉaĵojn kiel karbo, oro ktp. Tia avida rabado renkontis fortan reziston de la popolo de Tajvan. Dum dudek jaroj de 1896 ĝis 1915 leviĝis pli ol cent fojo da armitaj ribeloj. "Malgranda ribelo po tri monatojn, granda ribelo po duon-jaron." Tiu diro resumas la historion

(daŭrigota sur p. 8)

ĈINAJ ESPERANTISTOJ PROTESTAS

KONTRAŬ USONA BOMBADO EN NORDORIENTO

La Usona imperiismo, invadante Koreion kaj Tajvan'on (台灣) nun faris pluan paŝon sin enŝtudi per aeroplanoj en la ĉinan teritorion de Nordoriento (東北) kaj bombadi ĉinajn civilulojn. La sangsoifanta imperiisma rabisto fariĝas pli kaj pli freneza. Nun la tuta mondo estas sub la minaco de nova milito instigata de ĝi.

Ni pacamaj esperantistoj en tuta Ĉinio forte protestas kontraŭ la agreso ago de Usonaj aeroplanoj kaj tutkore subtenas la solenan proteston de Ministro por Eksterlandaj aferoj Ĉoŭ En-laj (周恩來) kontraŭ la Usona registaro kaj liajn akuzojn kaj proponon submetitajn antaŭ la Sekuro-Konsilo de U.N.

Ni protestas per persistado kaj plifortigo de nia porpaca batalo. Ni alvokas esperantistojn en la tuta mondo

unuigi en nia komuna batalo kontraŭ imperiisma milito. Konu kaj diskonigi la agresajn agojn de la Usona imperiismo. Ni aŭskultu kaj aŭskultigu la kolerajn protestojn de la invaditaj kaj masakritaj popolanoj. Ni senmaskigu la mensogon de la hipokrita agresanto kiu uzurpas la sanktan nomon de la Unuigitaj Nacioj. Ni interligu per la internacia komunikilo Esperanto la pacamajn popolojn en la tuta mondo, interŝanĝi niajn spertojn en la porpaca batalo kaj konstruado. Nur per la komuna batalo de la tuta pacama homaro, ni povos fine frakasi kaj entombigi la mondskalan invadanton kaj efektivigi pacon tiel sopiritan de Zamenhof, la iniciatinto de Esperanto.

La Prepara Komitato de la Tutĉinia Esperanto-Ligo

8, septembro, 1950.

Faktoj de Usona Agreso en Tajvan

En la 24a, aŭgusto, Ministro de Eksterlandaj Aferoj Ĉoŭ En-laj (周恩來) telegrafis al Jakov Malik, Prezidanto de la Sekuro-Konsilo, kaj S-ro Trygve Lie, Ĉefsekretario de la Unuigitaj Nacioj, protestante kontraŭ la Usona invado al Tajvan (台灣) kaj postulante ke la Sekuro-Konsilo prenu tujajn rimedojn por efektivigi la plenan eltirigon de ĉiuj Usonaj armitaj fortoj invadantaj la insulon. Post tio la oficistoj de la Usona Defenda Departemento rapide publikis deklarojn, provante kovri la faktojn de Usona agreso en la ĉina teritorio de Tajvan.

Laŭ depeŝo de U.S.I.S. (Usona Informa Servo) el Vasingtono, datita je 25. aŭgusto, "Oficistoj de Usona Defenda Departemento deklaris kategorie,

ke estas nenia Usona milita personaro sur la insulo de Formosa (Tajvan), ĉe ne militaj misioj. La aerforto deklaras, ke nenia Usona aerplanaro estis postenita sur Formosa. La militŝiparo diris, ke neniam aeroplanoj aŭ ŝipoj de la militŝiparo vizitis Formosa'n lasttempe."

Sed la klara fakto estas, ke la Usonaj intervenistoj ne nur sendis siajn armitajn fortojn por invadi Tajvan'on sed estas ilin fortigantaj. Usona milita misio delonge ekzistas en Tajvan. Antaŭ monatoj, grupo de Usonaj militistoj, estrataj de Charles M. Cooke Jr., antaŭa Komandanto de la Usona Okcident-Pacifika Ŝiparo, alvenis al Tajvan por helpi la Kuomintangajn banditojn en iliaj militaj preparoj. Post kiam la milito kontraŭ Usona invado eksplodis en Koreio, MacArthur malkaŝe nomis sian vicĉefon de stabo Generalo-majoro A.P. Fox por estri la Militan Interkomunikalan Oficejon en Tajvan.

En 16. aŭgusto, ĉi tiu Milita Interkomunikala Oficejo estis transformita en la Esploran Grupon de Usona Ekstremorienta Komando en Tajvan kun Generalo-majoro A. P. Fox kaj Kolonelo L. J. Fortier kiel ĉefo kaj vicĉefo. Poste en 22. aŭgusto, MacArthur revokis Fox kaj metis iun Brigadan Generalon B.S. Conklin en respondecon pri la tiel nomata esplora grupo. Kvankam ĉi tiu grupo estis etikedita "esplora grupo," neniu povas nei la naturon de ĉi tiu organizo kiu estas entute milita misio.

Kontraŭe al tio kion la Usona militŝiparo diris, ke "neniaj ŝipoj vizitis Tajvanon lasttempe," la venoj kaj iroj de Usonaj militŝipoj estas tre viglaj. Ekde 5. aŭgusto, 11 Usonaj kroziŝipoj, destrojeroj,* cisterneŝipoj kaj transportŝipoj alvenis al havenoj Kilung (基隆) kaj Kaoŝiung (高雄).

En la 21a, nur kvar tagoj antaŭ ol la Usona Militŝipara Departemento donis esprimon al ĉi tiu "granda mensogo," la Usona 25,000-tuna kroziŝipo "Worcester" alvenis al Kilung. Alia 30,000-tuna militŝipo de la Usona militŝiparo ankaŭ eniris la havenon en la 25a.

Estas delonge publika sekreto, ke la Usona aerforto havas bazon en Tajvan. La proparolanto de la Kuomintang restajo deklaris en 4. aŭgusto, ke kelkaj Usonaj ŝpruce-aeroplanoj alvenis al Tajvan tiun tagon por defendi la insulon kaj Generalo-majoro Howard Turner, Komandanto de la 13a Usona Aerforto, ankaŭ alvenis en Tajpej (台北).

En 7. aŭgusto, la interkomunikala oficejo de la Usona 13a Aerforto estis formale starigita en la stabejo de la Kuomintang aerforto en Tajpej. De tiam la Usona 13a Aerforto rapidigis aeroplanojn el Manila al Tajpej kaj la unua grupo da personaro ankaŭ surterigis en Tajvan.

Ĉiuj ĉi faktoj pruvis, ke la Usonaj armitaj fortoj invadis la teritorion, la teritorian maron kaj la teritorian aeron de Ĉinio, intervenis en la internaj aferoj de Ĉinio, malobeis la Ĉarton de la Unuigitaj Nacioj kaj minacas mondpacon. Ĉi tiuj estas faktoj kiujn la oficistoj de la Usona Defenda Departemento ne povas nei.

* Rapida, malpeza armita ŝipo pli malgranda ol malpeza kroziŝipo, angle "destroyer".


POPOLA MONDO

Dulingva organo de Ŝanhaja Esperantista Ligo.

Jarabono (12 numeroj) inkluzive sendkoston: US\$ 1.20 (aŭ egalvaloro).

Specimeno kontraŭ bildkarto aŭ 1 respondkupono.

Adresu ĉion al Ŝanhaja Esperantista Ligo, Poŝtkesto 636, Shanghai, Ĉinio.



LANDKARTO DE TAJVAN

Sur La Tero De La Demokrata Koreio

Li Ĉuang (李莊)

Ni havis la ŝanceon vojaĝi de Pjong-
jang en la okcidenta parto de Koreio
al Vonsan sur la orienta marbordo.
La vojaĝo kovris 220 km. trakurante
la duoninsulon de Koreio kaj ĝian
bone konatan montaron Tajbajksan,
belega pajzaĝo. La zigzagan mont-
dorsan kovras diversaj koniferaj kaj
larĝfoliaj arboj. Ili formas maron de
verdaĵo kaj la aero estas saturita de
freska aromo. La membroj de la korea
memdefenda armeo faras patrolon sur
la monta ŝoseo kun ĵetarmiloj por
gardi la malfrontan sekurecon. La mont-
aro estas gracia kaj fortika, aminda
kaj afabla, same kiel ĝiaj posedantoj.

En la norda parto de Koreio ofte
aŭdiĝas bombado. Usonaj aeroplanoj,
kiuj flugas el Japanio, masakras
sangsoife la pacemajn popolanojn de
Koreio. Sed ni vidis dumvoje, ke
miliono da koreoj daŭrigas sian
laboron malcedeme. En vilaĝeto 15
km. for de Pjongjang, mi parolis kun
fruktovendistino. Tiam la ĉefurbo estis
sub la bruteca bombado de Usonaj
aeroplanoj kaj volvita en densa fumo.
Tiu kvardeksepjara koreino rigardis
kviete kaj malbenis subvoĉe. Ŝia edzo
estas ministro, kiu laboris jam 17 jar-
ojn. Ŝiaj du filoj
ankaŭ estas min-
laboristoj. La
unuanaskito mal-
saniĝis antaŭduon-
jaro kaj restas en
lito. Sed la dua
laboras kune kun
la patro. Kaj la
familio vivas tole-
reble bone. La
batalo eksplodis,
la dudekdujara
filo Li Biongkuj
soldatiĝis. Ŝi vend-
as frukton por
helpi la edzon. La
hejma vivo iom
pli malfaciliĝas ol
antaŭe.

Mi demandis,
kial ŝi sendis sian
filon al la armeo.
Ŝi respondis senhe-
zite: "Ĉar li volis
iri kaj mi kon-
sentis. Ja por
la sendependeco de la patrolando!"
Kion signifas sendependeco, la koreoj
komprenas plej klare. Ŝi diris: en
libera Koreio ŝi loĝas en bela loĝejo
por laboristoj, kiun distribuis la respub-
liko, kaj manĝas bonan rizon plej
ŝatatan de koreoj. Sub la regado de
japanoj, ŝi vivis en kaduka pajla
kabano, kaj manĝis fabolecan feĉon,
kiun japanoj enportis el nia Nordori-
ento. Nun usonanoj invadas Koreion.
Ŝian ĵus ricevitan liberan vivon minacas
grava danĝero. Ŝi ne toleras tion kaj
oferas sian filon al la patrolando. En la
tuta lando 1,300,000 viroj jam aliĝas al
la armeo, tio signifas, ke jam aperas
4,300,000 tiaj edzinoj aŭ patrinoj. Tiu
mezaĝa virino aldonis fine: "Ĉiuj
koreaj junuloj iros rezisti la usonan
invadon kiel mia filo!" Vere, la prezid-
anto de la provinca komitato de
Nord-Koreia Nodongdang (Laborista
Partio) en Kangvon-Provinco K-do
Lin Cun-ĉu, diris al mi, ke el la
1,200,000 loĝantoj de Kangvon-Provinco
115,000 jam aliĝis al la armeo, preskaŭ
dekono de la tuta loĝantaro. Tia forto
igos la usonanojn tremi kaj fine ilin
venkbatos.

Ni trairis parton da monta vojo por
viziti certan minejon. Ĉar estas en
milita tempo, mi ne rajtas eldiri ĝiajn
nomen kaj produkton. La admini-
stranto diris: "La minejo baldaŭ ĉesus
funkei, ĉar ĉiuj laboristoj volas iri al la
fronto. Se ĉiuj 1,300 ministoj forlasus,
kie mi trovus la anstataŭulojn? Ni
mobilizis kaj persvadis. Fine ni retenis
grandan parton kaj nur pli ol 30
foriris." Antaŭ la milito, oni laboris
sep horojn ĉiutage subtere, kaj ok
horojn ekstere respektive. Nun ili
memvole plilongigis la labortempon je
unu horo. Kaj la tuta tagnokto divid-
iĝas en tri periodojn. Oni laboras
laŭvice. Ripozas la homoj, sed ne la
maŝinoj. Ni vidis ankaŭ, ke aroj de
fortikaj laboristoj ricevas milittrejn-
on. Antaŭ hejmiro ili partoprenas milit-
ekzercon post la laborhoru.

Tiuj bravaj laboristoj kondukis min
al sia nove riparita aŭditorio kiu povas
enteni 1,200 ĉeestantojn. En tiu aŭdi-
torio filmoj estas projekciataj ĉiusa-
bate. Ili diris, ke iliaj manĝaĵo kaj
vestaĵo estas porciumitaj de la regi-
staro (enkalkulante ankaŭ la infanojn
kaj gepatrojn super sesdek jaroj).
Krome, ĉiu ricevas subvenciojn je
1,300-2,000 koreaj
dolaroj ĉiunmonate.
Loĝejon ludonas
la ŝtato. Generale
la lupago de unu
domo estas 50-60
koreaj dolaroj.
Tamen ilia ĉefa
enspezo estas la
superprodukta pre-
mio, kiu ofte
superas kelkoble
la difinitan sub-
vencio. Kiam la
laboristoj aŭ iliaj
familianoj mal-
sanas, ili ricevas
senpagan kurac-
adon. Ili havas
(Daŭrigota sur p.8)



GERILANINO DE KOREIO



Ĝearmeanoj de Korea Popola Armeo intime parolas kun kamparanoj

DEKLARO DE LA PAKKOMITATO DE ESP-ISTOJ

En Stockholmo estas fondita la 9-an
de majo 1950 Esperantista Komitato
por defendo de la Paco. Tiu ĉi porpaca
komitato aliĝas al la Stokholma Re-
zolvacio de Konstanta Tutmonda Kom-
itato de Paĉdefendantoj, kiu tekstas
jene:

"Ni postulas senkondiĉan malper-
meson de la atom-armilo kiel instru-
mento de teror-minacado kaj hombuĉado.

"Ni postulas starigon de severa in-
ternacia kontrolo pri plenumo de tiu
ĉi rezolvacio.

"Ni opinias, ke registaro, kiu kiel la
unua uzos kontraŭ iu ajn lando
atomarmilon, faros krimon kontraŭ la
homaro kaj devas esti rigardata kiel
militkrimulo.

"Ni alvokas ĉiujn homojn de bona volo,
ke ili almetu sian subskribon sub tiun
ĉi deklaron."

Ĉi tiun alvokon ni respondas per tio,
ke ni admonas la esperantistaron kon-
ŝcie kaj diligente labori por realigi
la belan Zamenhofan reŝon pri tutmonda
eterna paco.

Ni devas fondi porpacaajn komitatojn,
kiuj celas esti interligiloj inter ĉiuj

landoj kaj nacioj. Nia tasko ankaŭ
estas traduki konvenan materialon el la
progresemaj internaciaj Esperantogaze-
toj kaj utiligi ĝin por la naciilingva
gazetaro. Kaj nature ni admonu ĉiujn
niajn korespondantojn partopreni la
laboron por la paco, tiamaniere kreante
nombron da interligitaj pacamikoj en
la tuta mondo.

Sed tio ne estas ĉio. Ni devas ankaŭ
provi per helpo de Esperanto ĉesigi la
"malvarman militon", kiu tiom ege
malhelpas al la evoluo de la mondo.
Ni klopodu disvastigi la veron pri la
progresemaj landoj, kaj samtempe ni
ne forgesu devualigi la militiniciatantojn
kaj tiujn, kiuj minacas la mondon per
atomarmiloj. Tiel ni plej bone sekurigas
la estontecon de nia movado.

Grandega laboro atendas nin! Ek al
la batalo por la paco!

ESPERANTO EN LA SERVO DE
LA PACO!

La Pakkomitato de la
Esperantistoj en Stokholmo.

Adr: K. V. Ahlberg, Björngårdsgatan
7, Stokholm So, Svedio.

LA MERITO DE KAMARADINO SUNHI

—Rakonto de gerila regiono en Suda Koreio.—

Ĉian (建)

En aŭtuno de 1949 okazis grandioza
heroa afero en gubernio Andong de
la provinco Norda Kjonsang.

Iun matenon, en la monto, kie
estas bazo de popola gerilo, juna
partizano kamaradino Sunhi—ŝi estas
tiel intime nomata de siaj kamara-
doj—elegante vestita kaj bele tua-
letita, estas preta foriri al la urbo.
Antaŭ sia ekiro, gekamaradoj de la
gerilo sin adiaŭis kaj atentigis ree
kaj ree: "Estu singardema!" For-
gesinte ke ŝi estas vestita en bela
kostumo sed ne en la uniformo de
gerilo, ŝi ankoraŭ salutas soldate kaj
adiaŭis la kamaradojn.

Survoje ŝi deŝiris belan ruĝan
lilion, kunligis ilin en bukedon kaj
volvis la pedunklojn per papero.
Kiam ŝi alproksimiĝis al la urbo
Taosan, sur vojo al la pupa polica
stacio, ŝi renkontiĝis kun iu forta
viro, kiu, rigardante ŝian bukedon,

ŝin demandis: "Kian floron vi
portas?" "Bela ruĝa lilio", repondis
Sunhi. Salutante per okuloj ili
disiĝis.

Kiam ŝi alvenis al la proksimo
de la polica stacio, iom sin trank-
viliginte, ŝi, saltante kaj kantante
"La la—", diris al la pupa
gardpoliceano antaŭ la pordo: "Sin-
joro, kiel vi fartas? Paĉjo ordonis
min meti tiun ĉi floron en vian
oficejon". La pupa gardpoliceano
ridetis kaj diris: "La estro estas
en la ĉambro, eniru, la floro
nepre lin plaĉos." La knabino diris:
"Mi ne volas eniri sole. Ni kune
eniru!" Tiel dirante ŝi tiris la
manikon de la gardpoliceano kaj
eniris al la polica stacio. La pupa
estro kaj aliaj kvin pupaj policeanoj
treege ĝojas pri la vizito. Enirinte
la ĉambron, Sunhi rapide apogas
sin sur la muro per sia dorso, kaj
tuj elprenas el la bukedo du

grenadojn. Ŝi levis siajn manojn
kaj ekkriis: "Restu senmove! Diabloj!
Ĉu vi opinias, ke mi al vi
prezentas florojn?" La estro ekre-
mis sed ankoraŭ allogite diris: "Se
vi ĵetus la grenadojn, ankaŭ vi
mortos kune, ĉu ne? Mi vin ne punos,
forlasu ĝin kaj reiru hejmen!"

Ĝuste tiam, la forta viro, kiu
renkontiĝis kun Sunhi sur la strato,
eniris kun partizanoj. La pupaj
policeanoj estas tute senarmigitaj.
La partizanoj, malfermite la pordon
de la malliberejo por patriotoj, libe-
rigis la malliberulojn kaj anstataŭe
ili enkarcerigis la pupajn policeanojn.

En la konferenco de popolamaso,
Sunhi laŭte diras: "Mi plenumis
mian taskon per mia vivo. Nun
alvenis la tago por venĝi la morton
de mia patro kaj multaj viktimoj
igintaj kamaradoj. Antaŭ ni,
ankoraŭ staras grava tasko, ni
devas daŭrigi nian batalon ĝis
tiam, kiam ni tute venkbatis la
malamikojn!"

Trad. C. L.

Intelektuloj ★ ★ ★ ★ ★

K A J

★ ★ ★ ★ ★ Agrara Reformo

Oŭjang Caj-vej (歐陽采薇)

Nur kelkajn monatojn antaŭ la liberigo de Pekino (北京), Prof. Lej Haj-zung (雷海宗) de Ĝinghua Universitato (清華大學), Kalumniis la tutan grandan revolucian movadon de la ĉina popolo kiel "aventuran agon de malsatigitaj kamparanoj", kaj la Ĉinan Komunistan Partion, senigitan de kelkaj ĝiaj fremdaj terminoj kaj sloganoj, kiel "duonsekretan fanatikan klanon." La antaŭen-marŝo de la Popolaj Armeoj iom lin maltrankviligis en la mezo de urbo gvidata de tiuj samaj "fanatikuloj".

Ĉinike li observadis la senĉesan transformiĝon de Pekino sub la rego de la nova reĝimo de popola demokratio. Lia malkonfido nur iom post iom forskuiĝis kaj estis anstataŭita per sento de miro. En januaro de 1950, li partoprenis en la laborgrupo por helpi la efektivigon de la agrara reformo en la periferiaj vilaĝoj. Estis de tiam ke li komprenis la akran klaskonflikton kaj kruelan subpremon en la paŝajn vilaĝoj. Samtempe pro intima kontakto kun la veteranaj partianaj kadroj, kiuj montris firman klasan starpunkton en la flanko de la popolo, li komprenis kiel revolucio finfine sukcesis sub la gvido de la Komunista Partio. Tiamaniere li mem estis transformita.

Prof. Lej estis nur unu el la centoj da intelektuloj, instruistoj, studentoj, verkistoj, artistoj kaj poetoj, kiuj aktive prenis parton en la historia agrara reforma movado en norda kaj nordorienta Ĉinio. De Pekino sole, ok cent iris al la kamparo, el kiuj troviĝis unuarangaj filozofo, pentristo, kariaturo, dramaturgo, lignogravura artisto, k.t.p.

Helpi la Kamparanojn Antaŭ la foriro por la peniga laboro, ili kolektiĝis kaj studis la politikojn de agrara reformo por unu semajno. Alveninte la vilaĝojn en 65 laborgrupoj gvidataj de spertaj kadroj, ili tuj sin ĵetis en praktikan komencan esploron la socian strukturon kaj klasajn enviceigojn en la regiono. Ili parolis kamarade kun aktivaj revoluciemaj elementoj inter la kamparanoj. Ili senpere studis la problemojn kiel diferencigi inter la diversaj klasoj de kamparanoj, kiel trakti ruzajn bienulojn, kiel, juste dividi la bienojn, domojn, brutojn kaj aliajn

produktilojn. Kiam la tempo por la plenumo de reformo venis, ili liveris ĉiujn siajn talentojn al la popolo. Pentristoj pentris afiŝojn, aranĝis murgazetojn, aktoroj kaj kantistoj propagandis la politikojn de la Popola Registaro per kantoj, dancoj kaj dramoj, studentoj helpis fari termezurojn kaj kalkulojn, verkistoj priraportis la progreson al la ĵurnaloj.

Multaj komencis la aventuron en romantika libertaga humoro, esperante plene ĝui la vintran belecon de Pekina kamparo. Prof. Aj Ĉung-ŝin (艾中信), pentristo, ĝuis kun admiro la pejzaĝon, tamen en la sekvantaj semajnoj li malmulte pentris. Tagoj da urĝa agado lasis lin en tumulto de penso. Sed sur la revena vojo la konfuzo enordigis kaj li trovis sian artistan vizon transformita. La montoj, salikoj kaj la urbo, ĉio kion li vidis, estis ne plu "pejzaĝo", sed scenejo de gigantaj historiaj ŝanĝoj. Nun li sciis kian socian signifon havis lia antaŭa impresionisma pentrado, kiu prezentis la burĝan mondon kun senzorga lumo kaj koloro, mondon de libertempo, ne de laboro!

Multaj art-studentoj ankaŭ vekigis el la doktrino de la burĝaj "nepolitikaj" artistoj, la pentristoj de fruktoj, floroj kaj graciaj nudkorpoj. Ili vidis kiel malproksima de la vivo de la grandaj popolamasoj tiu kosmopolitismo estis. Iu studento skribis en sia taglibro, "Amo al la amasoj devas esti la fonto de nia artista kreado."

La pentraĵoj de la sekvanta ekspozicio de la studentoj montris plenan ŝanĝon. Portretoj de kamparanoj kaj laborherooj havis novan kvaliton de realismo. En la novjaro (laŭ la ĉina luna kalendaro kiun la kamparanoj observas kaj kiu komencis ĉijare je 17 feb.) la kamparanoj povis ornamati siajn domojn per novaj pentraĵoj de la junaj artistoj, montrantaj la abundajn tagojn post la agrara reformo, la viziton de sovetaj agrikulturaj specialistoj al ĉina farmo, la ordenadon de laborherooj, k. e., anstataŭ pentraĵoj montrantaj antikvajn diojn kiel antaŭe.

Pro la konstanta kontakto kun la kamparanoj, ili konis pli klare ke la



TERMEZURO

Lignogravuraĵo de Niu Ven (牛文)

ekonomio de la lando dependas ĉefe de la grandiozaj kaj penigaj laboroj de la kamparanoj. Iu profesoro kiu plendadis en la pasinto pri sia nesufiĉa salajro, nun publike diris ke li devas labori pli energie por ĝin meriti. Studentoj el riĉaj bienhavaj familioj alvokis siajn gepatrojn preni pozitivan parton en la agrara reformo, oferi memvole la bienojn kaj domojn al la malriĉaj kamparanoj, tiel helpante la reforman laboron en ĉia ebleco.

Kamparanoj instruas intelektulojn La partopreno de intelektuloj en la agrara reformo havis specialan signifon en Pekino. La plejparto de tiuj intelektuloj, precipe la profesoroj, estis studentoj en Anglio, Usono, kaj aliaj kapitalistaj landoj, kaj sekve ili nature transdonis sian fundamente burĝan edukadon al la studentoj. Multaj estis "nepolitikaj" — se ne reakciaj. Eĉ la progresemaj intelektuloj, kiuj ludis kuragan rolon en la revolucia movado, estis inspiritaj de etburgaj motivoj. Ili ne konis la revolucian signifon de tiuj burĝaj rajtoj, kiel ekzemple, libereco pri parolo, penso, organizo kaj kunveno, por kiuj ili batalis, en rilato kun la popolamasoj. Se ili malsatis la bienulan sistemon, tio devenis el nebula sento de egalismo. Nun, en la kamparo ĝuste ĉirkaŭ la bone de ili konata Pekino, ili trovis ke la krueleco de feŭda sistemo ja ĝismorte mizerigis la ĉiutagan vivon de la malriĉaj aŭ dungitaj kamparanoj.

La ĉesto de la kunvenoj, kie bienuloj estis akuzataj, aŭ kie la kamparanoj plendis pri sia pasinta

mizero, estis neforgeseblaj travivaĵoj por ĉiuj. En iu akuza kunveno, tri mil personoj denuncis unu brutecan bienulon, atestantoj post atestantoj rakontis kun larmoj de malĝojo kaj kolero kortuŝajn kaj tragikajn historiojn de liaj krimoj — la batado kaj mortigo de kamparanoj, la perforto de virinoj, k.t.p., k.t.p., unuvorte, senfina rakonto pri eldevigado kaj turmentado.

En iliaj raportoj al la ĵurnaloj, la intelektuloj de Pekino priskribis ne nur kiel ili vekigis al la dolora sorto de la kamparanoj sub la malnova reĝimo, sed ankaŭ kiel ili gajnis freŝan komprenon pri la forto de la kamparanoj, ilia kapablo de elportado, de heroo ago kaj de profunda sento. Ili miregis je la rapideco kaj justeco per kiuj la kamparaj kunvenoj solvis komplikitajn problemojn en la procedo de la agrara reformo, kiuj eĉ embarasis spertajn kadrojn. Estis la popolamasoj kiuj tre ofte malkovris novan intrigon de la ruzaj klasmalamikoj. Ili konvinkigis ke la okuloj de la popolamasoj estas klaraj kaj la forto de la popolamasoj granda.

La intelektuloj helpis reformi la longjaran feŭdan agraran sistemon de Ĉinio. Tio siaflanke ankaŭ helpis ilin sin reformi. Tio donis al ili pli klaran penetron en la historiajn taskojn de la revolucio, kiu forbalais la teruran ekspluatadon je la plejmulto de la ĉina popolo, la kamparanoj; tio donis al ili ankaŭ pli klaran komprenon de ilia propra rolo en la transformoj okazantaj en Ĉinio. Tio helpis ilin fariĝi pli bonaj civitanoj de Popola Ĉinio.

Trad. Nojo Lo

LA STALBATALANTO JANG KIN-TANG

— KOMPARTIANO SUR LA BATAL-FRONTO —

Vang Liu-ĉiu (王流秋)

(1) En la Milito de Huajhaj-Regiono (淮海區), iu bataliono de nia Armeo ricevis ordonon etendi la tranĉeo-fosadon proksimen al la malamiko en la Vilaĝo Ĉen (陳莊). Vic-kaporalo de la unua subpelotono de la 42a roto Jang Kin-tang (楊金堂) malgraŭ sia malsano, parto-

prenis la fos-laboron. Li pensis: "Nur malfacileco estas provo por kompartiano." Kiam la kapitano deprenis de li la fosilon, li diris: "Kiel mi povas resti senfara dum ĉiuj aliaj ŝvitas?"

(2) La Bataliona Komandejo ordonis al la Kvara Roto ke ĝi per forto de unu

subpelotono rapide okupu altan tombon dudek metrojn sudoriente de la malamika barikado de la Vilaĝo Ĉen, por ŝirmi en sekureco la tutan batalionon dum fosado. La kapitano donis ĉi taskon al la unua subpelotono. Jang Kin-tang diris: "Konfidu al ni, Kapitano! Ni garantias plenumi la taskon."

(3) Li alkuris al la alta tombo kune kun tri batalantoj, kaj tuj alflugis pluvo da grenadoj kaj kugloj de maŝinapiloj. Jang Kin-tang estis vundita je la kapo,

kaj li mallaŭte diris al la vundita Malgranda Ŝju (小許): "Malgranda Ŝju! Ĉu vi povas grimpi returnen?" Kaj samtempe diris al la aliaj du batalantoj, ke ili rapide fosu ŝirmejon kaj pretigu mangrenadojn.

(4) Haltis la malamika pafado kaj la kapitano alkuris demandi: "Ĉu vi povas persisti?" Li ekpuŝis la kapitanon: "Bonvolu reiri. Ĝi tie ne povas resti plia persono! Se nur mi restas ĉi-tie, la malamiko neniel povas suprenveni!"



(1)



(2)



(3)



(4)

KAMPARANOJ SKRIBIS AL PREZIDANTO MAŬ



En la posttagmezo de la 19a de junio, okaze de la Drakboata Festo¹⁾ laŭ la luna kalendaro, la 5a vilaĝa kongreso estis kunvokita en Loĉuang-Vilaĝo (羅圈夾村), Kuandian-Gubernio (寬甸縣), Liaŭtung-Provinco (遼東省), Nordorienta Ĉinio. Ĉe la Sidejo de la Vilaĝa Registaro amasiĝis reprezentantoj de la popolo. Dum la antaŭaj kvar kongresoj la reprezentantoj ja fervore eldiris siajn opiniojn sed neniel kompareble al la ekscitiĝo kaj ĝojego de ĉi tiu fojo, la ridado ne estis tiel sonora kaj la esprimo de sentoj ne tiel kortuŝa. Ĉar ĉifoje la reprezentantoj decidis skribi dum la kongreso leteron al la respektinda gvidanto, Prezidanto Maŭ, unuflanke prezenti gratulon al la Ĉina Komunista Partio je la okazo de la 29a datreveno de ĝia fondiĝo, kaj aliflanke, por raporti al Prezidanto Maŭ pri la stato de siaj vivo kaj produktado post la agrara reformo.

Maljunuloj sidantoj sur la norda kango²⁾ ridetis kaj karesis siajn barbojn en raviĝo, kvazaŭ rememorante; mez-ajuloj paŝadis tien kaj reen en la ĉambro, priparolante pri boniĝo de la vivo; junuloj kaŭrantaj sur la sojlo balancis en ridado kaj de tempo al tempo intermetis meze de la ĝojplena bruo kelkajn frazojn: "Ni akiris ŝancon por studado", "Mi jam ellernis pli ol tri cent ideografojn", "Mi nun scipovas enskribi kontojn kaj skribi simplajn leterojn". Juna reprezentanto de la virinoj sur la suda kango aldonis mallaŭte, kvazaŭ timante alies aŭdon, "Nun estas eble serĉi mem sian amaton, kial ni ne skribas pri tio?" Kaj tion dirinte ŝi ruĝiĝis sur la vizaĝo.

La skribanto aranĝis ĉies eldiraĵojn kaj skribis la jenan leteron:

La 19-a en de jun. 1950.

Estimata Prezidanto Maŭ.

Nia vilaĝo estas en la plej fora parto de Kuandian-Gubernio, Liaŭtung-Provinco. Ĉi tie la montoj estas altaj kaj rokoj abundas. La tero estas tiel malfekunda ke oni ofte diras: "En tiu ĉi loko eĉ ne fekas leporoj". Sed eĉ el tia tero, kiom da muoj estis en niaj manoj en la pasinteco? En la tuta vilaĝo de 152 familioj kaj 2,511 muoj da kulturebla tero, la 11 familioj de bienposedantoj kaj rikamparanoj okupis pli ol mil muoj. Kaj eĉ pri tia malmulte produktanta tero, niaj pratroj generacion post generacio sopiris:

(5) Malgranda Ho (小賀) venis por bandagi la vundon de Jang Kin-tang laŭ ordono de la kapitano, sed Jang Kin-tang lin ordonis reiri por peti la kaporalon tuj sendi kelkajn mangrenadojn.

(6) La malamikoj denove sin ĵetis el la barikado por atako kaj mangren-

'Kiel ĝojinde estus, se unu tagon ni povos posedi tri ĝis kvin muoj da tero kaj kulturi nian propran kampon!'

Prezidanto Maŭ, gvidanto karega, nun jam realiĝis tiu idealo, ĉar dum la jarkon de 1947, agrara reformo kompletigis en nia vilaĝo. Antaŭe, ni elspezis nian energion sur alies bienoj, sed nun ni laboras sur nia propra tero; antaŭe, per unu ŝultro ni devis porti la rizpelson por la bienposedantoj³⁾ sed nun ĉiom da fruktoj de nia laboro apartenas al ni mem. Tiukaze, ĉu estas iom ajn strange, ke granda estas nia efarto en produktado, kaj rapida la altiĝo de nia vivnivelo? Rigardu, kara Prezidanto Maŭ, la kvanto de produktaĵoj en 1942 estas superita. En 1942, el ĉiu muo, la meznombra rikolto nur atingis 230 ĝinojn, kaj lastjare, pli ol 300 ĝinojn. En la pasinta jaro la tuta vilaĝo rezervis pli ol 100,000 ĝinoj da greno, krom la tutjara elspezo kaj pago de la publika greno⁴⁾.

Dum la Drakboata Festo en la pasinteco, infanoj de la bienposedantoj vestite bele kaj diverskolora promenadis tra la stratoj. Niaj infanoj nur povis meti pecon da verda branĉo malantaŭ orelo kiel esprimo de festecelebro. Tamen, naivaj estis la infanoj. Vidinte la bele vestitajn infanojn de la bienposedantoj, ili kuris hejmen kun ploranta mieno kaj tumulte kriis "paĉjo, mi deziras novajn vestojn!" "Panjo, mi deziras ovojn!" "Avino, mi deziras mangi zungze⁵⁾!" Kaj la gepatroj, konsternitaj jam de la penso ke eĉ ĉifonoj estas malfacile akireblaj, malpacientiĝis kaj batis la infanojn sur la postvangoj. La lastaj forkuris, plorante, kaj eĉ el la distanco de sep- aŭ ok-dek paŝoj estis aŭdebla ankoraŭ ilia balbuto: ".....novajn vestaĵojn.....ovojn.....zungze....." Kiel ĉagrenitaj ni estis en la koro! Sed hodiaŭ? Niaj infanoj nun ankaŭ saltadas sur la stratojn en diverskoloraj vestoj, kaj malgraŭ la pluveto, ĉie troviĝas ili en kanto: "Oriente ruĝas sun", ĉe ni estas Maŭ Zetung....." ".....Ne elbas finrakonti pri bonfaro de la Kompartio....."

Rigardu nun, bonvole, al niaj loĝejoj. Antaŭ la agrara reformo, niaj domoj estis eĉ malpli bonaj ol staloj de la bienposedantoj. Elirante oni devis kurbigi sian talion kaj enirante oni devis klini sian kapon. Tion ni nomis "Du salutoj ĉe la pordo". Nun ni jam transloĝiĝis en la de ni konstruitajn domojn. Kaj ankoraŭ ne sufiĉas la loĝejoj; ni plu konstruas sepdek kvar novajn. Domoj disdonitaj dum la agrara reformo estas plejparte riparitaj.

Vang Ming-lian (王明連) de nia vilaĝo ofte diris: "Antaŭ agrara reformo tio en mia domo kun kvar kruoj estis la benketo, kaj tio kun felo, la muso. Nun en la stalo estas ligitaj unu bovo kaj unu azeno". Post tiu eldiro, li

laŭkutime ridis dum momento kaj aldonis: "Atendu kaj post kvin pluaĵ jaroj, mi nepre havigos al ni arojn da ĉevaloj kaj muoj." Tio ja estas vera. En la tempo de agrara reformo, nia vilaĝo havis nur okdek kelkajn brutojn kaj nun, cent okdek kelkajn; ĉiu familio havas almenaŭ unu. Tang Teming (唐德明) de nia vilaĝo akiris, dum la agara reformo, unu bovon, kaj nun li havas tri bovojn kaj unu azenon.

Kara, respektinda Prezidanto Maŭ, je la okazo de la 29a datreveno de la naskiĝo de la Ĉina Komunista Partio, bonvole akceptu nian donacon—la plimultigon de produktaĵoj en nia vilaĝo je 70 procentoj super la ĉiujara kvanto. Kiel plimultiĝi? Dum ĉi tiu nia kongreso ni jam pridiskutis tion kaj decidis ke ekde nun ĝis la tempo por pendigo de la sarkilo⁶⁾ tri ĉefaj aferoj estu faritaj: Unue, ekde nun estu komencata la duafoja sarkado kaj garantiu la plenumon de la tria fojo; due fekundigu la teron per la nun preparitaj tri plensargaj-ĉaroj da ekskremento de koko kaj porkoj; kaj trie, rekonstruu la digojn.

Ho, restas ankoraŭ unu afero al vi raporti, Prezidanto Maŭ. En nia tuta vilaĝo, ĉiuj familioj partoprenas en interhelapaj grupoj, escepte tri familioj kies laborpovaj anoj jam soldatiĝis, kaj la teron ni kulturas por ili. Dum organizado de interhelpo, ni ĉiuj komprenas, ke tiu ĉi estas "la neevitebla vojo el malriĉeco al abundeco". Prenu kiel ekzemplon, la interhelpan grupon de Han Ĉin-hua (韓金華) en nia vilaĝo. La lia estas unuaklasa modela interhelpa grupo en Liaŭtung-Provinco, kaj la unue organizita en nia vilaĝo. La vivnivelo de liaj grupanoj pli rapide altiĝis ol la nia. Dum la unu jaro de lastjaro ĝis nun, ili jam gajnis tridek milionojn da dolaroj nur per flankaj okupoj. Vidinte la profiton de organizo, ni ankaŭ ekorganiziĝis.

(7) La Tom-maŝinpaŝilo de Jang Kin-tang sonadis klare kaj obstine, kaj ĝia klara kaj obstina sono kuraĝigis kelkcent fosilojn de la tuta bataliono. La batalantoj deprenis siajn vatitajn vestojn kaj energie fosadis, kaj iom post iom la tranĉo etendiĝis kaj alproksimiĝis al la malamika barikado.

(8) Kiam Jang Kin-tang—la honora kompartiano, estis trifoje vundita kaj svenis falinte en sangon la tuta bataliono jam bone plenumis la taskon de proksimiĝa tranĉo-fosado; kaj la frataj rotoj ekatakis el tiu ĉi avantaĝa pozicio kaj per tre malgranda pago ekstermis la tutan malamikan trupon de la Vilaĝo Ĉen nur en dudek minutoj.

Dum celebrazo de la 29a datreveno de la naskiĝo de nia savinto—ni krias en unuigo:

Vivu la Ĉina Komunista Partio!

Vivu Prezidanto Maŭ! Bonan Sanon al Prezidanto Maŭ!

La tuta membraro de la Unua Kongreso de Popolaj Reprezentantoj de Loĉuang-Vilaĝo, Pahoĉuan-Distrikto, Kuandian-Gubernio, Liaŭtung-Provinco

"Antaŭ ol la skribinto povis laŭtleĝi la finitan leteron, ekstaris trideknaŭ - jara Ĉang Zu-jo (張祖悅), reprezentanto de la virinoj:

Aldonu frazon por mi, diru ke mi

sendas al Prezidanto Maŭ mian bondeziron."

Dirinte ŝi residigis kaj ĉirkaŭrigardis. Ŝi daŭris post momenta pripenso: "Mi ankaŭ devas raporti al Prezidanto Maŭ pri la rezultato de mia produktado, por ke Prezidanto Maŭ vidu, ĉu mi, kiel partiano, efektive taŭgas por esti modelo. Mi partoprenis interhelpan grupon ekde lastjare, kaj en unu jaro mi aĉetis per mia perlabora mono, kvar kompletojn da vestoj, unu azenon, unu bovon, kaj unu porkon."

Elĉinigiĝis C. S.

1) La festo, okazanta je la kvina tago de la kvina monato laŭ la luna kalendaro, primemoras eminentan poeton Ĉu Juan (屈原), en antikva Ĉinio (ĉ. 343 a.K.). Li sin ĉirigis en rivero kaj tiam el la riĝoj de rememoro en la postaj tagoj estas konkurso de drakboatoj.


2) Speciale konstruita lito el tero aŭ brikoj. Ĉi estas hejtata en vintro kaj ankaŭ servas kiel seĝo, en norda Ĉinio.

3) t.e. vivteni la bienposedantojn.

4) agrikultura imposto, kiu en Nord-orienta Ĉinio malaltiĝis de 23% el la rikolto en 1948, ĝi 19.5% en 1949. En 1950 la proporcio estas eĉ pli malalta.

5) Festena manĝaĵo dum la Drakboata festo preparita el rizo, pizo, sukero kaj kelkiam viando, ĉirkaŭvolvita per kanafolioj en la piramida formo.

6) Fino de kampalaboro.



(5)



(6)



(7)



(8)

LA FILM-INDUSTRIO DE ĈINIO

Caj Ĉu-ŝeng (蔡楚生)¹⁾

Estis en 1904, kiam la imperiistoj unue enkondukis sian kinon en Ĉinion. Ekde tiu tempo ĝis la venko de la Liberiga Milito, kiu finis ilian superregadon, ili estis senbridaj, kun la silenta konsento de la militistaro kaj la Kuomintang-registaroj, en sia ekspluatado de ĉi tiu industrio kaj arto, preskaŭ entute por siaj intereso kaj fonto de sia profito kaj rimedo de kultura propagando. Tiuj progresemuloj, kiuj deziris liberigi ĉi tiun en Ĉinio novan arton kaj ĝin direkti al la servo por la popolo, devis fari akran lukton kontraŭ la koruptaj produktantoj el la imperiistaj landoj kaj la senkompata persekuto kaj cenzuro de pupoj de Hollywood kaj Wall-Strato en Ĉinio. Nur dank'al la starigo de la Popola Respubliko ekestis la necesaj kondiĉoj por la disvolvigo de la popola kino kaj elradikigo de imperiista influo en la ĉina film-industrio.

De 1915 ĝis 1931 filmkompanioj organizitaj de Usonaj kaj ĉinaj komercistoj komencis funkcii en 13 urboj, kun Hongkongo (香港) kaj Ŝanhajo (上海) kiel la ĉefaj centroj. La artistika nivelo de la 300 filmoj produktitaj dum tiu periodo, estas tamen tre malalta. Ili estis plejparte ideologia veneno por la popolo. Surtute je feŭdismaj kaj kompradoraj ideoj, ili prezentis superstiĉajn kaj ofte malĉastajn rakontojn pri supernaturaj estaĵoj, aŭ dramigis banalajn incidentojn el burĝa vivo.

Inter 1931 kaj 1932, kiam la japanaj faŝistoj invadis la Nordorienton de Ĉinio kaj poste Ŝanhajon, la laborantoj en la film-industrio finfine vekigis el siaj komfortaj sonĝoj de "per arto por arto" kaj ekkonis siajn sociajn respondecetojn. Progresemaj literaturaj laborantoj konatigis al la film-laborantoj la atingojn de sovetiaj filmoj kaj artistaj teorioj en Marks-Leninismo. "Krozoŝipo Potemkin" de Eisenstein estis elmontrita en Ĉinio tiel frue kiel 1926. La ĉefaj film-laborantoj komencis enkonduki la idealojn de nova kulturo en la sferon de kino.

Unuaj Progresemaj Filmoj La novaj filmoj celis ne nur al malkaŝo de korupto en la reacia Kuomintang-regimo, sed ankaŭ montris al la popolo kiel batali kontraŭ feŭdismo kaj imperiismo.

Estis nature, ke la kuomintang-diktatoreco, respondis al ĉi tiu nova disvolvigo en kino per freŝaj subpremoj.

Malgraŭ rigora subpremo de la Kuomintangaj reaktuloj, la pioniraj progresemaj filmoj ricevis varman publikan subtenon. Ili gajnis ankaŭ rekonon en la internacia kultura mondo. *Kanto de Fiŝkaptistoj* (漁光曲), priskribante pri ekspluatado en la fiŝejoj, akiris premion en la unua Sovetia Filma Festo en 1934. Inter aliaj elstaraj produktantoj menciindaj, estas *La Tragedio de Du Studentoj* (桃李劫), *Tri Modernaj Knabinoj* (三個摩登的女性), *La Perdiĝinta Ŝafido* (迷途的羔羊), *Eskapo* (逃亡), *Novaj Virinoj* (新女性), *Marŝo de Junuloj* (青年進行曲), *Diino de Libero* (自由女神), *Strataj Anĝeloj* (馬路天使), *Urbaj Noktoj* (城市之夜), *Ĉe la Kruvojo* (十字街頭), *La Printempa Silkratipo* (春蠶), kaj *La Torento* (狂流). Je tiu tempo, la teknika nivelo de la industrio jam grande plibonigis.

Kiam la japana invado komencis je la 7a de julio, 1937, ĉiuj progresemaj film-laborantoj mobiliziĝis por servo al la rezistmilito. Ili evakuis Ŝanhajon por Hankau (漢口) kaj poste por Ĉungking (重慶) nur kiam la armeo mem forlasis.

Filmoj fariĝis grava armilo sur la kultura fronto kontraŭ la invadantoj. Malgraŭ la ĝeneralaj milittempaj malfacilaĵoj, memorindaj produktantoj elvenis el kinaj artlaborejoj. *En Defendo de Nia Lando* (為祖國而戰), *Bapto de Fajro* (火的洗禮), *Ŝtormo ĉe Norda Landlimo* (塞上風雲), *Hejmurbo trans la Nubo* (白雲故鄉), *Vivu Ĉinio* (中國萬歲) kaj *La Speciala Milit-Albumo* (戰事特輯), ĝuis tutlandan popularecon. *La Heroa Defendo de Paŝan*, *Urbo* (寶山喋血記), *La Malgrandaj Kantonoj* (小廣東), *Brila Estonteco* (前程萬里), kaj *La Nacio Hurlas* (怒吼的中國) produktitaj de niaj film-laborantoj en Hongkongo, ankaŭ trovis vastan kaj ŝatantan spektantaron inter la amasoj.

En 1941, la japanaj faŝistoj etendis sian invadon al Sudorienta Azio. Ilia okupo de Hongkongo, tiutempe la ĉefa kunigilo inter Ĉinio kaj la alia parto de la mondo, severe influis provizaĵojn por la film-industrio. La plej serioza frapo, tamen estis efektiva je tiu ĉi tempo de la Kuomintangaj reaktuloj. Jam dum la unua aperigo de la progresema movado en la kina sfero, la Kuomintangaj reaktuloj starigis "Societon por Ekstermo de Komunistoj

Post la malvenko de la japanaj faŝistoj en 1945, Ŝanhajo, Nankino (南京), Ĉangĉuno (長春), kaj aliaj grandaj urboj plufoje fariĝis centroj de filmproduktado. Malgraŭ severa limigo de la Kuomintangaj reaktuloj kaj malfavora laborcirkonstanco, progresemaj film-laborantoj sukcesis fondi aŭ subteni privatajn kompaniojn. Elstaraj filmoj de ĉi tiu periodo inkluzivas *La Rivero Fluas Orienten* (aŭ *Larmoj de la Jangtze* 一江春水向東流) kiu akre kontrastas la lukton de la popolo kun la egoisma, korupta vivo de Kuomintangaj altrangaj oficistoj, dum la anti-japana milito. *La Odo pri Tri Virinoj* (麗人行), rakontas pri la renkonto en revolucio de tri virinoj el malsamaj socitavoloj. *La Edzino de Kamparano Hsiang Lin* (祥林嫂), bazita sur romano de Lu sin (魯迅) montras la mizeran vivon de virinoj sub la malnova reĝimo. *Sur Rivero Sungari* (松花江上), *Longa Estas la Vojaĝo* (八千里路雲和月), *Ĉiuj Familioj Celebras* (萬家燈火), *La Gastejo* (夜店) ĉina traduko de "Malsupra Profundaĵo" de Gorki kaj *Esperplena Mondo* (希望在人間), ĉiuj prezentas krizajn sociajn problemojn al la atento de la spektantaro.

Tiuj ĉi atingoj provokis novan

(東北三年解放戰爭), dokument-filmo; *La Ponto* (橋), trajto-filmo pri restatigo de fervojo; *Returno al Nia Propra Armeo* (回到自己的隊伍來), rakonto pri kamparana konskripto de la Kuomintang kiu finfine aliĝis al la Popola Liberiga Armeo; *Filinoj de Ĉinio* (中華女兒), kortuŝa historieto pri anti-japanaj partizanoj batalantinoj; *Batalantoj en Blankaj Vestoj* (白衣戰士), kies temo estas virinoj de la medicina korpuso; *La Nevidebla Fronto* (無形的戰線), kiu priskribas la malkovron de la Kuomintangaj spionoj; *Ĉau Ji-man* (趙一曼), rakonto de la Rezisto kaj *Radiana Brilo* (光芒萬丈), epizodo dum restatigo de elektretoj. La Pekina Film-kompanio produktis dokument filmojn pri la decida Huaj-Haj Kampano²⁾ kaj *La Venka Transiro de Jangtze* (百萬雄師下江南).

La jaro 1950 estas grava tempo por la nova film-industrio de Ĉinio. Estos produktitaj ĉijare de la tri ŝtata filmproduktejoj 26 plen-longaj trajto-filmoj, 17 dokument-filmoj, unu teknikolora³⁾ trajto-filmo, 48 novaj filmoj, 40 represo de sovetiaj filmoj kun ĉinaj dialogoj, kaj 36 represo de Sovetiaj edukaj filmoj kun ĉinaj subtitoloj kaj dialogoj. Plie, privataj kompanioj en Hongkongo kaj Ŝanhajo planas produkti 50 novajn filmojn kaj nombro da ĉinaj represo de sovetiaj filmoj. Ĉijare la ŝtatposedaj entreprenoj planas organizi pli da vojaĝantaj elmontraj unuoj por kamparaj regionoj kaj starigi fabrikojn por procedo de filmoj kaj provizo de ekipoj por la kreskanta industrio.

La ĉina film-industrio sisteme eliminis la malbonan heredon de la pasinteco kaj mobilizas sian potencon por la estonteco. Speciala propaganda komitato estas starigita por popularigo de la plej bona sovetiaj filmoj tiel ke la ĉina amaso ilin konu kaj ĝuu. Inter aliaj, *La Juna Gardio*, *La Ordinara Soldato*, *Kanto de Siberio* kaj *La Kampara Instruistino* jam akiris vastan popularecon. La unua du el ĉi tiuj inspiris multajn junulojn aliĝi al la Nov-demokrata Junula Ligo.

Vastigita Antaŭe, sub reaktulo subpremo **Horizonto** de la Kuomintang, la ĉinaj film-laborantoj estis limigitaj en la selekto de temoj por siaj kreaĵoj kaj en la prezentmetodo de la revolucia mesaĝo en la filmoj. Hodiaŭ la kino havas antaŭ si vastigitan horizonton. Sekvante la instrukciojn de Prezidanto Maŭ Ze-tung (毛澤東), kiu jam en 1942 montris la vojon de kreado por ĉiuj literaturaj kaj artaj laborantoj, la kinaj profesiuloj nun intensigas sian penadon en la lernado kaj praktiko de Marks-Leninismo, kaj de sovetia kinarto.

Ili rekte partoprenas la vivon de la popolo kaj lernas el ili. La plej lastatempaj filmoj, kun nova nekaŝemo kaj realismo, pritraktis centrajn temojn de la liberiga milito kaj nacia rekonstruado. Ili donas novan komprenon al la amaso kaj inspiras la popolon kun fiera revolucia fervoro, kiam Ĉinio antaŭeniras por plenumo de siaj grandaj, novaj, historiaj taskoj.

Trad. Censinio



EL LA FILMO "FILINOJ DE ĈINIO"

en la Film-industrio." Nun, kiam ili publike konfesis sian politikon de "pasiva rezisto al la japanoj kaj aktiva ofensivo kontraŭ la Komunistoj", kiam miloj da personaro de la Komunist-gvidata Nova 4a Armeo estis masakritaj sude de la Jangtze-Rivero (揚子江) en 1941, progresemaj film-laborantoj estis ĉasitaj el siaj postenoj kaj la film-industrio, kiel parto de la patriota movado, estis efektive ĉesigita en Kuomintang-kontrolita teritorio.

Filma Centro Aliflanke, ekde la **en Jenan** aŭtuno de 1938, Jenan (延安), stabejo de la popola revolucia milito kontraŭ Japanio, fariĝis jam nova centro por filmaj aktivoj. Malgraŭ blokado de la Kuomintang, film-laborantoj tie prosperis al si improvizi kinan artlaborejon, kaj utiligante "Eyemo-j"²⁾ ili sukcesis produkti sian unuan dokumentan filmon *Jenan kaj la Okavoj Armeo* (延安和八路軍), Tiu ĉi estis sekvata de multaj aliaj sukcesoj kiel *La Unua Kunveno de la Jenan Urba Konsilo* (延安第一屆市參議會), *La Revolucia Festo de Oktobro* (十月革命節), *Industria Ekspozicio de la Border-regionoj* (邊區工業展覽) kaj *Kunordigo de Produktado kaj Batalo*.

subpremon de la Kuomintang. Pli ol 30 film-laborantoj estis metitaj sur la "Nigra Listo" de la sekreta servo kaj se ili ne eskapus frue, ili estus murditaj kun aliaj progresemuloj antaŭ la liberigo de Ŝanhajo.

La tutlanda venko de la Popola Liberiga Armeo finfine obligas grand-skalan disvolvigon en la ĉina film-industrio en la servo por la Popolo. La centroj de la industrio jam pasis al la manoj de la popolo. La Buroo de Kinematografia Arto sub la Ministerio de Kulturaj Aferoj nun direktas ĉiujn filmkompaniojn, inkluzive de la Nordorienta Filmkompanio, la Pekina Filmkompanio, la Nova Ŝanhaja Filmproduktanta Kompanio kaj aliaj. Sub ĝia direkto ankaŭ estas 55 vojaĝantaj dokument-filmaj unuoj. La Buroo respondecas por la distribuo kaj elmontrado de filmoj tra tuta Ĉinio, kaj ĝi ankaŭ kuraĝigas kaj helpas privatajn kompaniojn.

En 1947-48, la Ĉangĉuna Filmkompanio en Nordorienta Ĉinio produktis naŭ dokumentajn filmojn. Ankaŭ produktitaj en Nordoriento estas *Tri Jaroj de la Liberiga Milito en la Nordoriento*

1. Fame konata film-reĝisoro, nun ĉefo de la Art-komitato de la Buroo de Kinematografia Arto, Ministerio de Kulturaj Aferoj.

2. Facilportebila kinofotografilo.

3. La regionoj sub gvidado de la Ĉina Kompartio dum la Rezistmilito konteŭ Japanio.

4. Batalo dum la liberiga Milito en la regiono ĉirkaŭ la Huaj-Rivero ĝis la marbordo.

5. Procedo de kolorfotografio uzata en kinematografia bildo.

INFANA ESPERO

— Czeng Ke (曾克) —

La aŭtorino naskiĝis en la jaro 1918 en Tajkang-Gubernio (太康縣), Honan-Provinco (河南省). Fininte sian mezlernejan edukon, ŝi iam laboris en infanvartejo, instruis la Ĉinan lingvon, redaktis gazeton *Literaturo Monata* kaj verkis por ĵurnaloj kaj gazetoj.

Ŝi iris al Jenan kaj lernis en partia instituto de la Ĉina Komunista Partio en 1941. En 1945 ŝi iris al la Border-regiono de Ŝansi (山西), Hopej (河北), Ŝantung (山東) kaj Honan (河南), estis elektita en la direkcion de la Federacio de Literaturo kaj Belartaj Laborantoj kaj partoprenis la redakcion de la gazeto *Nordo*.

En 1947, ŝi partoprenis la memdefendan militon kontraŭ la Kuomintanga atako. Kune kun la armeo gvidata de generalo Liu Po-ĉeng (劉伯承), ŝi transiris la Flavan Riveron kaj marŝis al Tapie-Montaro (大別山) inter Honan kaj Hupej-Provinco (湖北省), kie ŝi partoprenis agraran reformon. En 1948 ŝi laboris en la redakcio de la ĵurnalo *Popola Batalanto* en la armeo dum ĝia suden kampanjo. En 1949 ŝi servis kiel speciala intervjuisto de la Novĉinia Novaĵejo en la armeo, kiu antaŭenpuŝiĝis al Ĉekiang-Kiangsi-Fervojo (浙贛鐵路).

Ŝi verkis la jenajn novelojn: *Novjaro*, *Amo*, *Pafistino*, *La Liberigo de 5000-Elektrejo*, *Ŝirmo*, *Nova Homo*, *La Sono de Tekmaŝino*, *Kono*, *Ŝturmulo*, *La Unua de Mi Konata Batalionestro*, kaj kolekton de rakontoj: *Marŝo al Tapie-Montaro*, el kiu estas la nuna rakonto tradukita.

Por trapasi Flavan Riveron (黃河) ĝustatempe, la trupo plirapidigis sian marŝon tiuvespere. Ĝi ekmoviĝis laŭ kutime je la kvina posttagmezo, kaj post la deka en la nokto jam atingis vilaĝon Menglung (夢隆), la celitan bivakejon, pli ol tridek kilometrojn for.

Kiam ni alproksimiĝis al la vilaĝo, iu en la lunlumo ĵetis sin al mia ĉevalo kaj sekvis bonekonata varma voĉo:

"Panjo!"

Mi surpriziĝis. Estis ne atendite, ke la infano venas kun sia patro min adiaŭi. Mi desaltis kaj levis ĝin sur la brakoj. Mi vidis, ke la infano kreskis dum la pasinta duonjaro, sed restas same fortika kiel antaŭe. Ĝi ne ploris, nur karesis mian vizaĝon per la manetoj.

"Kiel vi povis ekkoni panjon?"

"Tie iu diris al ni, ke panjo rajdas sur blanka ĉevalo, kaj mi ankaŭ memoras, ke panjo havas harplektaĵon, tial mi tuj ekkonis." La infano diris triumfe kun naiveco, balancante sian kapeton tien kaj reen.

Mi portis ĝin surbrake en domon de vilaĝano sur la strato. Tie ĝi jam pasis du noktojn kun sia patro. Dum du tagoj kaj du noktoj ĝi rigardis al la trupoj, kiuj pasis seninterrompe tra la strato al la transirejo. Ĝi esperis trovi min inter la pasantaj amasoj. La dommastro parolis al mi kortuŝite:

"Donu al ĝi kareson? Ĝi ne bone dormis du noktojn vin atendente. Eĉ en la profunda nokto, aŭdante alvenon de iu trupo ĝi ekleviĝis por renkonti panjon."

En tiu nokto, la etulo babilis senĉese pri tio kaj ĉi tio, kaj estis pli gaja ol en la novjaro. Ĝi fermis la buŝeton malgraŭvole kaj endormiĝis kviete kun kontenta rideto nur kiam la troa lacigo sloŝis ĝiajn palpebrojn.

Tuj kiam la fenestroj komencis paliĝi, la etulo remalfermis sian gorgon kiel matena pasero. Ĝi rakontis al mi, ke ĝi jam seipovis pentri la portretojn de Prezidanto Maŭ Ze-tung (毛澤東), Komandanto Liu Po-ĉeng (劉伯承) kaj Lu Sin (魯迅). Ĝi diris ankaŭ, ke la vaksakraĵoj, kiuj oĉjo Aj Jen (艾炎) sendis el la fronto, jam elĉerpiĝis, kaj demandis kial oĉjo Ĝi Kuej-sen (計桂森) ne sendas al li pentraĵojn. Ĝi de ziris vidi bildojn de grandaj bataloj de la Liberiga Armeo. Ĉio ĉi montris lian estetikan postulon. Mi rimarkis, ke ĝia intereso pri pentro



ne ŝanĝiĝis kaj eĉ kreskis. Ju pli ĝi babiladis, fariĝis des pli bonhumora, fine ĝi provis min per demando:

"Ĉu vi kredas, panjo, ke mi povas transformi kolorojn?" Kiam ĝi vidis, ke mi ridas sen respondo, ĝi kraketis per lango kaj daŭrigis triumfe: "Miaj verdaj kraĵoj elĉerpiĝis. Intage mi pentris per la blua sur la flava, ho, jen naskiĝis la verdo!"

Por infano havanta malpli ol ses jarojn, tiu malkovro ne estis ja simpla afero. Tio ekmemorigis min: antaŭ nelonge, kamarado Ĉen In (陳因), vidante ĝin pentri anason en profilo, donis al li interesan teston. Ĉen demandis ĝin:

"Jen Ing (延嬰), kiom da okuloj la anaso havas?"

"Du."

"Kial do mankas unu al via anaso?"

Ĝi ne respondis la demandon rekte, sed igis kamaradon Ĉen staranta kun la flanko kontraŭ ĝi, dirante:

"Vi havas du okulojn, sed tiamaniere mi vidas nur unu."

Ĉiuj miregis, kiel ĝi malkovris la principon de perspektivo. Depost tiam ĝi fariĝis la amata lernanteto de la kamaradoj-artlaborantoj, kaj lernis fari skizojn kun unu okulo fermita kiel la plenaguloj. Ĝi ofte malkovris karakterizajn trajtojn de la objektoj. Kiam la kunludantaj infanoj ne povis distingi inter ĉevalo, azeno kaj mulo, li diris: "Rigardu, la ĉevalo havas mallongajn orelojn sed longan kolhararon, dum ĝia vosto glitas dise kaj vilaĝ estas la hufoj; la azeno havas longajn orelojn sed mallongan kolhararon kaj ĝia vosto estas en la formo de bastono; ĉe la mulo ĉio estas nek longa nek mallonga."

Dumtage la malamikaj aeroplanoj krozis freneze super la vilaĝo kaj en la direkto de la transirejo. Ili intencis malhelpi la transiron de niaj taĉmentoj. Ĝi foje aŭdante la eksplodon, la infano diris kun rondigitaj okuloj plenaj de vengema malamo:

"Malbenita estas Ĉiang Kaj-ŝek (蔣介石), la testudino! Li malpermesas infanojn pentri. Li militas kaj ĵetas bombojn por mortigi popolanojn kaj bruligi la belajn pentraĵojn. Ni nepre faligu lin!"

"Kaj tial panjo iras kun la Liberiga Armeo por faligi lin," mi respondis senatente.

Subite ĝia kapeto turnis sin al nova problemo, ĝi demandis:

"Panjo, franjo Haŭvang (好望) havas anjon, ĉu mi havas ankaŭ? La anjo de Haŭvang estas la panjo de sia panjo. Sed kie estas via panjo?"

"Vi havas ankaŭ vian anjon. Kiam ni estis en Jenan (延安), anjo iafaje sendis al vi ŝuetojn. Nun ŝi restas kun malgranda onjo sub la premado de Ĉiang Kaj-ŝek. Ni povos ilin liberigi nur post lia falo."

La infano kriis entuziasme:

"Panjo, tuj faligu Ĉiang Kaj-ŝeki Mi volas vidi anjon."

Vespere ni devis transpasi la Flavan Riveron (黃河) por ĉasi la malamikojn. Kvankam la sento de la infano estis sana kaj ĝi bone komprenis kion mi iros fari, sed la tuja disiĝo post unutaga kunesto kun mi sendube malĝojigos ĝin. Por eviti la tro ekscitan scenon de la foriro de la granda trupo, ni interkonsentis forlasi la vilaĝon antaŭe en la posttagmezo kun la infano al la najbara vilaĝo en la nordo.

"Panjo, min iom akompanu! Lasu min rajdi sur via blanka ĉevalo granda." Kiam ĝi aŭdis, ke ni foriros kun ĝi, neatendite ĝi tre gajis kvazaŭ ĝi perceptis nenion.

Mi metis ĝin sur la blankan ĉevalon, Ni forlasis la vilaĝon triope rajdante. Ĝi infaneece petis min iri pli rapide kun la ĉevalo. Mi kontentigis ĝin. Ni iris malpli ol kvaronon da kilometro, ni demandis tentante per mallaŭta voĉo:

"Nun sidu sur la ĉevalo de paĉjo, panjo devas foriri."

"Ne, mi volas, ke panjo akompanu min iom pli!"



"Bone, mi akompanos vin ankoraŭ iom pli, sed ĝis kie? vi mem diru."

"Ĝis la tiea maiza kampo," li respondis kontentigite.

Mi iris plu, kondukante ĉevalon por ĝi. Ni tuj alvenis al la maiza kampo. La ĉevalo haltis. Je mia mencio pri la disiĝo, ĝi konpreneme ne proponis plu senraciajn postulojn. Mi transportis ĝin sur la ruĝan ĉevalon. Sed kiam miaj manoj ĝin delasis, ĝi ekploris.

"Kio estas, Jen Ing?" mi vokis konsolante.

Ĝi respondis per plora voĉo:

La brako de paĉjo tuŝegis mian vizaĝon."

Bone sciante ke tio estas simple preteksto, mi tuj etendis mian manon dirante:

"Mi batas paĉjon por vi!—Kial puŝtuŝegis kontraŭ Jen Ing!"

Ĝi tuj retenis sin de plorado kiel klara infano. Tiam ĝia paĉjo diris ĝustatempe:

"Jen Ing estas bona infano, ĝi ne ploras. Panjo revenos vin preni post kiam ŝi faligos Ĉiang Kaj-ŝek."

Ĝi reakiris sian gajan humoron kaj diris:

"Panjo, mi ne ploras. Jen Ing havas belkolorajn kraĵojn kaj belajn bildojn kaj vidos anjon nur kiam Ĉiang Kaj-ŝek estos jam faligita."

Mi kapjesis kaj ĉesis pluri. La ruĝa ĉevalo ektrotis antaŭen. La infano sidis en la sino de la patro kaj ambaŭ ili ne rerigardis.

Tenante la blankan ĉevalon per rimeno ni staris ĉe la maiza kampo kaj dum longe aŭdis la forŝvebantajn kantojn de la infano:

Mi estas soldateto Okavoja

Kaj amas denaskiĝe la liberon,

Se iu ajn aŭdacas min insulti,

Mi pugne, sendos lin en la inferon!

Trad. S.J. Zee

IMITINDAJ EKZEMPLOJ

Lasttempe ni ricevis multajn informojn de niaj fervoraj k-doĵ pri utiligo de la materialoj el nia bulteno. Ni sincere ilin dankas, ĉar tiaj laboroj eatas tre valoraj ambaŭ por la solidariĝo de la frataj popoloj kaj la diskonigo de Esperanto. Sube ni publikigos la nomojn de niaj plej fervoraj kunlaborantoj kaj la artikolojn de ili utiligitajn.

K-do Niilo Kavenius, redaktoro de la progresema tagĵurnalo UUSI PÄIVÄ en Finnlando, utiligis materialojn el la artikoloj:

1) Maja Tago en Popola Ĉinio (el n-ro 1)

2) Laboristoj Penegas Konstrui Novan Ĉinion (el n-ro 1)

3) Nova Vivo de la Liberigitaj Prostituitinoj en Pekino (el n-ro 1)

4) Ĉina Popolo sur Paca Fronto (el n-ro 2)

K-do Ivan Kovačev, sekretario de Bulgara Esperantista Asocio, utiligis la jenajn:

1) Vidvino Tjen Gardis Siajn Kukurbojn (el n-ro 1)

2) Nova Tipo de Kampula Gastejo (el n-ro 1)

3) Vivnivelo Altigas en Manĉurio (el n-ro 2)

4) Ŝanhajo en Transformiĝo (el n-ro 2)

5) La okuloj de Blinduloj Malfermitaj (el n-ro 2)

K-do T. Kurisu, estro de Internacia Fako de Japana Esperanto-Asocio utiligis:

1) Vidvino Tjen Gardis Siajn Kukurbojn (el n-ro 1).

2) Ĉina Popolo sur Paca Fronto, (el n-ro 2)

K-do Saga Tadashi, SEAT-peranto en Japanio, utiligis: "Almozulo Fariĝas Distriktestro" (el n-ro 1). Lasttempe li faris valoregan kunlaboron per la eldono de japanlingva gazeto "Popola Ĉinio", kies enhavo estas ekskluzive tradukita el nia bulteno.

K-do Imrich Zalupský, redaktoro de "Práca", slovakingva tagĵurnalo en Ĉeĥoslovakio, utiligis:

1) Laboristoj Penegas Konstrui Novan Ĉinion (el n-ro 1)

2) Vidvino Tjen Gardis Siajn Kukurbojn (el n-ro 1)

3) La Popola Armeo en Produktado (el n-ro 2)

TRA LA MONDO KAJ LITERATURO, esperanta gazeto eldonita en Pollando, represas materialojn el la artikolo "Esperanto en Nova Ĉinio" (el n-ro 2)

NEDAL, slovakingva gazeto, represas materialon el "La Okuloj de Blinduloj Malfermitaj" (el n-ro 2)

La Red.

KULTURAJ NOTOJ

Laŭ verkplano en 1950 de nordorientaj literaturaj laborantoj la verkotaj literaturaj sumiĝas 466 pecoj. 288 el ili ampleksos pli ol 4,400,000 vortojn. 98 verkoj inkluzive romanojn, novelojn, teatraĵojn, kinodramojn kaj poemojn, estas enhave fiksitaj. Sume 42 prifabrikaj, konsistigas 42.7% el la tuto, 27 priarmeaj, konsistigas 27.4%, 26 pri-kamparaj konsistigas 26.4%.

Japanoj sub regado de Usonaj imperiistoj ne nur pli kaj pli mizeriĝas laŭ vivkondiĉoj pro la kolonieso sed ankaŭ ege sufokiĝas en siaj kulturaj vivoj. La vastaj popolamasoj ege sopiras la novan kulturon de Popola Ĉinio. Sed tradukado estas malpermesata de la imperiistaj regantoj pretekstante, ke tio pekas kontraŭ la rajto de ĉinaj verkistoj. Por forigi la barilon kaj por frakasi la pretekston de la imperiistoj, 51 famaj ĉinaj verkistoj inkluzive k-dojn Maotun (茅盾), Ting Ling (丁玲), Ĉaŭ Ŝuli (趙樹理) k. c. anoncis lasttempe fordoni la tradukajn rajtojn de siaj verkoj al la japana popolo. Nun en Tokio, la ĉefurbo de Japanio, organiziĝis jam speciala komitato por respondecu tiun komision.

La klasika literaturo de Ĉinio estas tre valora kaj tre riĉa. Tamen pro ĝia grandega amplekso kaj malfacila klasika skriba lingvo, estas malfacile por ĉinoj ilin kompreni, des pli por fremduloj. Lasttempe la redakta komitato de Arta Burao de Kultura Ministerio dediĉas apartan forton por la retaksado kaj kribrado de la klasikaj literaturaj. Du serioj estas planataj: Unu pri ĉinaj klasikaj literaturaj kaj la alia elekto de ĉinaj historiaj poemoj. La laboro estas entreprenata

SUR LA TERO (Daŭrigo de p. 3)

20-tagan libertempon ĉiujare. Sed nun ili abolis ĝin memvole.

"Ni havas bonan landon. Nia vivnivelo ĉiujare plialtiĝas. Nun la usonanoj invadas ĝin, ni devas ekstaru por ĝin defendi." La laboristoj menciis sian landon preskaŭ en ĉiu frazo. La Korea Popoldemokrata Respubliko estas vere aminda lando.

Apud arboriĉa varma fonto ĉirkaŭita de montoj kaj valoj ni vizitis milit-hospitalon. La administranto de la hospitalo Majoro Bak Ĉu estas tre kapabla mezaĝulo. Antaŭe li servis en armeo kiel regimentestro. Li retiriĝis pro ftizo kaj estis nomita al la nuna posteno. Li diris kun kuntiritaj brovoj: "Ĉi tie la pacientoj ofte forkuras. La vunditoj volas returni al la fronto antaŭ ol ili tute resaniĝas. Se vi malpermesas, ili forkuras." La hospitalo povas enteni 6-700 homojn. Depost la komenco de la milito, multe da batalantoj jam returnis al la fronto, enkalkulante la supre menciitajn forkurintojn. La administranto aldonis: "Nun ĉio estas por la fronto. Antaŭmilito, ĉi tie estis sanitarejo por militistoj. La varma fonto entenas pli da sodo ol da sulfuro kaj estas bona trinkaĵo por la intest-kaj stomak-mal-sanuloj. La komandantoj kaj batalantoj malbone fartaj povis veni ĉi tien por ripozo, se ili ricevis permeson. La ripozperiodo estas ĝenerale dudek tagoj. Laŭ statistiko, la korpa pezo de la ripozantoj ĝenerale kreskas je du kg. en dek tagoj. Dum la restado ili manĝas panon kun lakto, bovaĵon, rizon kaj brasikon. Ĉio estas senpaga. Sed la kanonoj ekmugis, kaj ili ĉiuj tuj forlasis. La sanitarejo fariĝis milit-hospitalo.

"Pli antaŭe, ĝi estis japana hotelo. Antaŭ 'aŭgusto 15', la tago de kaptulacio de Japanio en 1945, nur la japanoj kaj koreaj bienuloj rajtis veni ĉi tien por ripozo aŭ trasomerado. La nunaj batalantoj de la popola armeo,

sur bazo de historia materialismo. Ĉiuj verkoj estas retaksataj kaj kritikataj. Oni decidis eldoni 3 aŭ 4 kajerojn de la unua serio antaŭ la jarfino. Eldonon de elekto de historiaj poemoj oni planis ankaŭ en la sama tempo.

TAJVAN

(Daŭrigo de p. 2)

de ribelo de la Tajvan'a popolo kontraŭ la kruela kaj tirana regado de la japana rabistbando. Majestaj estis la Granda Armita Ribelo de Oktobro, 1930 kaj la Kontraŭ-japana Batalo de la Tajvan'a

Ĉang Ĉing-tien (張慶田)

Printempo En Vilaĝo

La prunarboj floras, milda briz' aromas.
La vilaĝo krevas je jubilo-freneza.
Brikojn oni portas, kaj kotkaĉon kirlas.
Hej hol! falegas ritme ramo peza.
Tie oni vokas: Surmetu la trabon!
Kaj ĉi tie: Venu starigi kolonojn!
La liberaj kamparanoj vivas gaje
Kaj konstruas interhelpe por si domojn.

Dika flava bov' kun brilglata harar'
Tiras la fekaĵo-ĉaron tra 1' kampar'.
Ĝi rapidas tiel foje kaj refoje,
Kaj aliaj ankaŭ, pli ol dek, survoje.
Vipo klakas en la man' de knab' gracia.
Venas jen knabin' tenante bridon de alia.
La du ĉaroj renkontiĝas ĉe laĝet',
Alparolas la knabino kun ridet':
"Frato, volu veti, kiu pli rapide pelos!"
"Ho silentu, brunjo! Ĉiel ajn mi vin superos!"

Kvazaŭ ciklono, rado-akvumilon
Rondtiras ferkolora azenid'.
Maten-akvum' valoras ja fekaĵon,
Jen la tritiko kreskas kun rapid'.
Fratino zorgas bedojn, frato bruton,
Surkampe sonoradas gaja rid'.
"O franjo, franjo, ŝtopu tuj la breĉon!
Bedlimon jam forlavis la torent'."
"Ha fraĵo, fraĵo, ne kriaŭ tiom!
Mi kantas al vi Ruĝas Orient'".

Milda printemp' moligas la sukecan teron
Kotonan kampon plugas jen sesdekjarulo.
Plugilon puŝas avo, nepo tiras bruton,
Laboron ili partoprenas kun plezuro.
"Mia infan'! prizorgu bone nian bruton
Vi post rikolt' ricevos belan kamizolon."
"O, kara avo, ne maltrankviliĝu!
Pliiĝa mi kondukos jam traktoron."
trad. S. J. Zee


* 'Ruĝas Oriento' estas la plej bone konata kanto en Ĉinio. Ĝi gloras la nomon de k-do Maŭ Ze-tung.

kiuj plejmulte devenas de la laborista kaj kamparana klasoj, certe ne estis kvalifitaj vizitantoj. Ĝi estis konfiskita post 'aŭgusto 15' kaj fariĝis sanitarejo post dujara riparado. Antaŭe kiu ne volus resti pli longe en tia bonega loko? Sed nun ĉiu krias por foriri antaŭ resaniĝo." Tiel finis la parolanto.

Genŝan, la finpunkto de nia vojaĝo, estas la ĉefurbo de Kangwon-Provinco situante sur la verda orienta marbordo de Koreio. Usonaj aeroplanoj detruis duonon de la urbo; multaj fremdaj ĵurnalistoj jam publikigis la kriman agadon de la usonaj aeroplanoj, kiuj buĉadas senhonte la pacemajn popolan-ojn. Ni vizitis la tutan urbon kaj inter la ruinoj mi malkovris la persistecon de koreoj. Multe da laboristoj kaj urbanoj okupis sin je la plenigado de la bombkavaĵoj. Dum la laboro ili interparolis pri la batalnovaĵoj publikigitaj en Nodong ĵurnalo (la organo de Korea Nodongdang). Laboristoj

popolo en la jaroj 1933 kaj 1936. Dum sia 51-jara regado, la japanaj invadantoj eluzis ĉiajn rimedojn por subigi la Tajvan'an popolon, sed neniam sukcesis.

Post la submetiĝo de Japanio, liberigite de sub ĝia sanga regado kaj reveninte en la sinon de la patrolando, la Tajvan'a popolo ja estis ĝojega.



Tamen la bandita kliko de Ĉiang Kaj-ŝek (蔣介石), komplete kun la Usona imperiismo, daŭrigis la barbaran subpremadon kaj rabadon, ĝuste kiel la japanoj. Tial denove leviĝis la Tajvan'a popolo kontraŭ la Usona kaj Ĉiang Kaj-ŝek-a reakeiularo. Fine eksplodis la fama Movado de "28. Februaro" en 1947, en kiu la Tajvan'a popolo armite kontraŭbatalis la atakon de la reakeiularo. Nun la Tajvan'a popolo soife sopiras al vera liberigo kaj fortege malamas la barbaran regadon de la Usona imperiismo kaj Ĉiang Kaj-ŝek-a banditkliko. Ĉia interveno kaj invado de la Usona imperiismo kontraŭ la ĉina teritorio Tajvan sendube suferos hontindan fiaskon sub la kunigita bato de la

bravaj Tajvan'a popolo kaj Ĉina Popola Liberiga Armeo.

Esperantigis Jang Theing

* Dum la 3a jarcento Ĉinio estis invadita de la nordaj gentoj. Multaj ĉinoj translokiĝis suden. Parto el ili enmigris en la regionojn nun ĉefe apartenantajn al la provincoj Fukien, Kuangtung kaj Kiangsi (江西). Ili konservas siajn moron kaj dialekton ĝis nun, kaj la indigenoj ilin nomas "gastoj".

Kunlaboru Tutmondaj Esperantistoj!

Traduko, represo, resumo kaj ĉiumanieraj utiligoj de materialoj en nia bulteno estas permesataj kaj bonvenataj, kondiĉe ke ili ne estos malice kripligataj kaj la utiliginto plenumos niajn jenajn petojn:

1) Post la traduko, represo, resumo aŭ aliaj utiligoj oni rimarki aparte el kiu numero de nia bulteno ĝi estas tradukita ktp.

2) Sendi al ni 4 ekzemplerojn de la traduko, represo aŭ resumo kaj sur ili noti el kiu numero kaj kiu artikolo ĝi estas tradukita ktp.

3) Sciigi al ni kia estas la ĵurnalo aŭ gazeto, sur kiu aperis la traduko, represo, aŭ resumo kaj, se eble, kiom da legantoj ĝi posedas.

Se iu el vi, karaj samideanoj, interesiĝas pri Popola Ĉinio, bone utiligas niajn materialojn kaj volas pli multe informiĝi, sciigu al ni vian bezonon kaj ni volonte vin provizos laŭeble.

"Plej bona propagando estas praktiko". Estas jam tempo por antaŭenpuŝi nian movadon al pli alta stadio ol nur propagandi. Kunlaboru, ĉiuj esperantistoj tra la tutmondo!

La Red.

ABONMANIERO

- 1 Senpagan specimenon ni sendos al ĉiu, kiu letere postulos. Se iu volas regule ricevi nian gazeton, volu pagi laŭ la tarifo.
- 2 Kun ĉiuj esp-eldonejoj kaj esp-gazetoj ni volonte interŝanĝos reciproke periodaĵojn aŭ librojn.

Abontarifo

Por legantoj en	Prezo de
U.S.S.R. kaj	12 numeroj
Orienta Eŭropo	6 rubloj
Britio	6 ŝilingoj
Hongkong kaj	HK \$6.00
Sudmaraj Insuloj	6.50 kronoj
Svedio	US \$1.25
Usono kaj	
Kanado	

Rim. 1. Sendkoston inkluzive, rekomendon ekskluzive.
2 Legantoj en ceteraj landoj povas aboni laŭ prezo por Usono.

國內定價：每期基價一元五角，全年十二期，基價十八元，郵費在內，掛號郵費另加

Trad. S. J.